

## Sesdek - 60

Okaze de la lastaj cent tagoj de la nuna estraro de ILEI, vi ricevis mesaĝon resumante la atingojn kaj malatingojn. La komencaj progresraportoj en 2009, aperis post 30, 60 kaj 100 tagoj. Ni celis sekvi similan mandatfinan ritmon, sed la sesdeka tago pasis antaŭ kelkaj tagoj, dum mi estis eksterlande. Reveninte, mi raportas kelkajn novaĵojn el tiu vojaĝo, celebre al sesdeko.

- La seminario de ILEI kadre de la 64a IFEF Kongreso venis al sukcesa fino, kun entute 14 partoprenintoj, kiu vidis kaj diskutis kursoskemon laŭ kiu eblis bone instrui Esperanton inter fervojistoj – precipe junaj. Planata estas daŭrigo en la sekva IFEF-kongreso en Bordo.
- La estraro de IFEF kune kun ILEI ellaboris tekston por interkonsento, kiun la du prezidantoj subskribis kune en la lasta kongresa tago. La estraro de ILEI rapide akceptis la tekston, tiel ke ĝi jam aperis en nia retejo (Dokumentoj > Kontraktoj) kaj estas konigata. IFEF havas tian kontrakton kun nur du aliaj fakaj asocioj, por ILEI temas pri la unua.
- La unua numero de *Juna amiko* aperis en la 26a de aprilo kaj atingis la plimulton el la legantoj. Tranokta duopa pakado permesis tiun senprokrastan liveron, evitante semajnan hiaton pro la partopreno de ILEI kiel observanto en la estrarkunsido de UEA en Roterdamo. La revuo havas iom novan aspekton kaj enhavon, okaze de la redakciaj ŝanĝoj.
- La dua numero de *Internacia Pedagogia Revuo* survojas al la legantoj, kaj alvenis ĉe iuj, tiel ke la ret-ricevantoj baldaŭ ricevos anoncon pri tio.
- ILEI salutis ne nur la IFEF-Kongreson, sed ankaŭ la tuj poste okazintan Komunan Esperanto-Kongreson en Berlino, kiu kunigis la germanan, danan kaj polan asociojn. La ligo prezentis siajn laborojn tie, okazis prezentaĵoj pri komunaj interkulturecaj projektoj por kunigi lernantojn trans limoj. La germana ILEI-sekcio (AGEI) okazigis sian jarkunsidon.
- Dum tiu aranĝo, ILEI faris unuajn paŝojn starigi regulan kunlaboron kun Eŭropa Esperanto-Unio. Unu el la komunaj terenoj por tiu kunlaboro estus ellaboro de pli kohera strukturo por la instruista trejnado (kiel skizita en la ĉefartikolo de la nuna IPR), kiu permesus aliron al instancoj kiuj povus doni al la nia sistemo gradon de oficialeco. UEA kaj ILEI kaj EEU ĉiuj havas kontaktojn kun ALTE (la Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo). Konsentite esplori, kia estas la sukcesverŝajno, kaj kian vojon oni devus sekvi por atingi tian rezulton.
- La nunaj planoj por la 46a Konferenco en 2013 estas okazigi ĝin en Germanio, en Sieber, montara urboparto de Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Estos je dispono ideale granda halo kun podio kaj bufeda kuirejo, kaj apude lernejo. Tri hoteloj sufiĉos por loĝigo, ĉio en facila promendistanco. Unu hotelo kun kafejo kaj restoracio, ĵus rebligita, estas posedaĵo de esperantista familio. En tuja proksimeco estas pluraj arbaraj kaj montaraj promenebloj, eĉ subĉiela naĝejo. Unua informilo kaj aliĝilo estos pretaj en julio 2012.
- Pri la pli tuja Konferenco en Kunming, sekvos informoj per apartaj mesaĝoj.

Kalkulante la tagojn!

Kore

Stefan MacGill  
Prezidanto de ILEI